

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 12 (27), Decembro 2006

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familia \$30; Regula \$20;
Studenta aŭ pensiula \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society.
Check should be payable to the **Esperanto Society of Chicago**, and mailed to our Treasurer, **Charles Gunn**, 828 S. Ada St, Chicago IL 60607

Kunvenoj:

Membroj de La Ŝikaga E-Societo kunsidas la kvaran mardon de ĉiu monato en:
Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Kara leganto! Vi tenas en la manoj la 25an numeron de la *Saluton!*, kiun eldonis kaj redaktis *Araneo*. Pli ol du jaroj la redaktoro sole rampis tra la senlima araneajo de la verda E-mondo por nia bulteno meze de ĉiu monato ĝustatempe atingu vin. Ne timu kaj ne malĝoju, la bulteno ne malaperos: en la sekvanta 2007 jaro ĝin aperigos eldon-teamo. Sendube, ĝi plibeliĝos kaj aperos je pli alta, profesia nivelo. Sed intertempe atente legu ĉi numeron, kie temas pri:

Zamenhofa Bankedo 2006

okazos la 17an de Decembro je 12.00 en **Reza** restoracio (persa kuirarto): **5255 N. Clark St., Chicago, IL 60640**. Enirprezo estos **\$24**, la salono sur dua etaĝo estos je nia dispoŝis 4 pt. Bufeda tablo kun vegetarana elekto + glaso da vino. La parkejo troviĝas je 5238 N. Clark. La estrino lernis Esperanton en Irano! Invititaj estas Ĝenerala Konsulo de Pollando kaj A-komitatano de UEA. Bonvenon!

Esperanto kaj Mondcivitanejo

estas la temo de nia lasta societa kunsido, kiun sperte kaj lerte prezentis d-ro Ronald Glossop (Santa Luizo). Jen, kion li konstatis. Homoj ofte demandas min, kial denaska parolanto de la angla estas Esperantisto? Efektive, estas du respondoj. La unua estas la morala kialo. La racia solvo de la lingva problemo estas ke ĉiuj en la mondo devus lerni la saman duan lingvon. Kiam mi unue pensis pri tiu ebleco, mi estis usonano kiu neniam aŭdis pri la lingvo Esperanto.

La dua kialo ke mi estas Esperantisto: mi volas esti vera mond-civitano, kaj mi opinias ke vera mond-civitano devas esti Esperantisto. Tiu, kiu lernas la anglan lingvon, povas partopreni en la granda parto de la mondo, kiu uzas la anglan, sed la situacio ne estas la sama, kiel esti civitano en komunumo. La angla estas nacia lingvo, kiun oni tamen nun uzas en multaj landoj de la mondo. Tial ĝi iĝis internacia aŭ inter-landan lingvon. Por mi tio estas tre malsama afero ol esti tutmonda aŭ tergloba lingvo.

Oni devas konstati ke la situacio en nia nuntempa mondo ne plu estas la sama kiel la inter-nacia mondo ekzistanta en la 18-a, 19-a, kaj 20-a jarcentoj. La mondo estis vidata kiel kolekto de relative sendependecaj landoj. Nun, en la 21-a jarcento, ni havas tergloban mondon.

Kiam D-ro Zamenhof proponis novan lingvon por tia mondo, li ĝuste nomis ĝin "la Internacia Lingvo". Tiam la mondo estis inter-nacia mondo, do oni kompreneble parolis pri inter-nacia lingvo. Aliuloj ĝin nomis "Esperanto", kaj baldaŭ ili konstatis, ke ĝi estas lingvo, per kiu



UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA – A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva – A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/espvi/va/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

23an de Januaro – pri sia volontula laboro en la *Promesita Lando* informos s-ano **Grigorij Dolgin**.

27an de Februaro – prelegos sperta Esperantisto d-ro **Lešek Kordylewski**.

27an de Marto – printempa Nova jaro. Pri persaj kutimoj kaj tradicioj informos **Sepideh Laal**.

Atenton: la programo povos esti ŝanĝata. La prelegontoj estas invitataj.

ordinaraj individuoj povus komuniki rekte kun aliaj individuoj.

La nigraj landlimoj kaj apartaj landaj registaroj ne plu estis tiel gravaj. Por Esperantistoj, pro la komuna lingvo, la landlimoj disfalis. Nova sento de solidareco kun ĉiuj homoj evoluis. La homaro ne plu havis nur “inter-nacian” aŭ “inter-landan” lingvon sed tute novan specon de lingvo, “tut-teran lingvon” kun tuthomara spirito. Sekve tiu lingvo kaj tiu spirito iĝis bazo de tute nova speco de komunumo, tutmonda komunumo. Kaj tiuj, kiuj apartenis al tiu komunumo kaj sentis lojalecon al ĝi, povas esti mondĉivitanoj, eĉ kvankam tutmonda registaro ĝis nun ne ekzistas

Mi volis iĝi parto de tiu nova tuttera komunumo, kaj mi vidis, ke Esperanto estas la plej bona ilo por fari tion. Mi vere konstatis, ke “Esperanto ne estas nur lingvo”. Iĝi Esperantisto estas iĝi parto de la nove evoluanta monda komunumo. Originale mi ne konstatis tion. Mi konstatis tion nur post kiam mi partoprenis en la Esperanto-movado kaj ekkonis individuajn Esperantistojn el aliaj landoj. Mi sentas, ke mi estas parto de vera tuttera komunumo bazita ne nur sur komuna lingvo, sed ankaŭ sur komunaj celoj kaj sento de solidareco. Oni povas diri, ke mi eklernis Esperanton, ĉar mi volis juste komuniki kun aliuloj kiuj ne uzis la saman nacian lingvon, sed poste mi restis Esperantisto, ĉar mi volas daŭre loĝi en la tergloba Esperanto-komunumo. Pro kaj per Esperanto mi povas esti kaj resti efektiva mondĉivitano.

d-ro Ronald Glossop

Nin invitas



– La plej grava E-evento de la venonta jaro – Universala Kongreso de Esperanto – okazos la 4-11an de Aŭgusto 2007 en la japana havenurbo Jokohamo. Nun aliĝis pr. 500 gesamideanoj el 42 landoj. Kiel kutime – ŝikaganoj!

– 55-a Kongreso de ELNA okazos en Tihŭano, Meksikio, 27-30an de Julio 2007. Petu pli da informojn de Mar Kárdenas: Garymar2000@aol.com aŭ de ELNA;

– Rusiaj Esperanto-Tagoj’07 okazos ĉe la Azova maro 18-25-an de Aŭgusto. Estas antaŭvidata varia studa, kleriga, ripoza, E-familia kaj movada programo, arta festivalo. Pli detalaj informoj estas troveblaj: www.stelaro.ru.




– **Atentu**, ke pli frue anoncita TAKE **ne** okazos en Kalgario venontjare, sed, probable, en Montrealo-2008.

Venonta numero, kiun ricevos nur **klubanoj** kaj **abonontoj**, raportos pri la Zamenhofa bankedo, enhavos raporton de la Societa agado dum la 2006 kaj konatigos vin kun Japanio – lando de la sekvanta UK de E-o.

Do, ĝis la!

De la tuta mondo kolektis informon via obeema servanto-redaktoro

 araneoesp @ yahoo.co.uk